Stine Andresen,

Tagmeza trankvilo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Varmegas sub tagmeza sun‘,
trankvil‘ surkampe regas nun;
alaŭd‘ ne kantas en aer‘,
enherbe sonĝas ĝi sur ter‘.[2]

Abel‘ ne zumas ie ĉi,
ĉe flor‘ ne flirtas papili‘;
la vent‘ sub floroj dormas jen,
perdrikoj kaŭras en la gren‘.

Sub poplo ĉe la vojo-rand‘
pro lac‘ kuŝigis sin migrant‘;
la arb‘, en silka vesto, sin
ne movas, por ne veki lin.

Traduko de la Germana poemo “Mittagsstille” de Stine Andresen *(geb. Jürgens, ∗1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1985-05.*

MR-185-3a / Arg-321-651 (2005-08-26 09:38:44)

La poetino vivis en Wyk aur la norda-frisa inaulo Föhr, estis edzino de muelisto, verkis krom la nordafrisa poemo “Swet hiamelkhaid” precipe poemojn en la germana lingvo.

[2] aŭ:
ne kantas bird‘ en la aer‘,
enherbe sonĝas sur la ter‘.